


# SKOLTA MONDO

OFICIALA ORGANO DE LA SKOLTA ESPERANTISTA LIGO



SKOLTA ESPERANTISTA LIGO  
(fondita en 1918)

CENTRA KOMITATO

PREZIDANTO:

DOUGLAS MURPHY  
7 Constable Road, Ipswich, Anglujo

SEKRETARIO:

J.K. HAMMER  
Wibautstraat 33, Zaandam, Nederlando

KASISTO:

DAVID H. WITHEY  
21 Brookfield Avenue, Waterloo, Liverpool 22, Anglujo

ĈEFREDAKTORO:

PASTRO H. A. ROSBACH  
Folldal, Norvegujo

HONORAJ PREZIDANTOJ:

L.J. VAN GULCK  
Wolfjagerslei 40, Borgerhout, Antwerpen, Belgujo.



Karaj geskoltoj!

Nova jaro venis, kaj kun ĝi novaj planoj, novaj deziroj, novaj esperoj.

En tiu ĉi numero vi recevovos ĝojan sciigon - kaj pri ĝi mi silentas ĉi tie.

Vi ankaŭ ĝojos trovi interesan farotaĵon, kiun ni tondis el nacia skoltgazeto.

Vi trovos skoltan kanton - kiel ordinare, - kaj vi trovos kontribucion de Malnova Skolto. Lin mi volas iom prezenti al vi:

Antaŭ longa tempo knabo ĵetis negan kuglon - kaj tafis la nukon de policisto. Tiu policisto - kiu devis esti taŭga sportisto! - post mallonga vetkuro kaptis la knabon je la jaka kolumo, lin tiel transportis al la patro - kaj okazis la juĝo:

La policisto ricevis cigaron, la knabo rajtis elekti inter bata puno kaj dono de la skolta promeso. Li elektis la skoltan promeson, kaj tiel iĝis LA UNUA SKOLTO de Norvegujo. Li nun kontribuas en LSM. Bonvenon!

La redaktoro.

+++++

Post la skolta promeso.

(Melodio: Bethany. (Dio, pli apud Vin)).

Skolte promesis mi  
je la honor',  
tial min helpu, Di',  
montri dum labor'  
kaj en la ludo, ke  
skoltoj dependas de  
Vi, ho ĉiela Reĝ',  
kaj Via leĝ'.


Al mia hejm', naci',  
patro, patrin',  
amon mi havu, Di',  
tial helpu min,  
ke mi en ĉiu tag'  
pretu al bona ag',  
iru tra vivo al  
ĉiela hal'.

Thora Martens.

Trad.: HAR Kum la permeso  
de la filino de aŭtorino.



dz/91.



VOLUMO III Numero 12 (58)

Unna jarkvarono 1965

### ADIAŬAJ VORTOJ DE PREZIDANTO VAN GULCK.

Karaj skoltaj gefratoj.

Estas ne kun plezuro, ke mi direktas tiujn eksiĝvortojn al vi je tiu momento de la demeto de mia funkcio kiel Prezidanto. Sed oni diras: " Venas momento por veni, sed ankaŭ por foriri ". Mi opinias, ke post la 12 jaroj de mia prezidanteco, tiu momento venis; pro personaj cirkonstancoj mi sentis la devon lasi la taskojn al iu, kiu povas finiĝi nian karan SEL. Mi multe ĝojis pri mia pasinta funkcio, kiu - certe - kelkfoje alportis malfacilaĵojn, sed la batalo ekestas por ke oni povu venki! En la persona vivo ĉiu renkontas la batalon por la ekzistado, kaj tio ankaŭ okazas en la vivo de ligoj kaj societoj. SEL nun ekzistas dum 46 jaroj, kaj mi ne dubas, ke ni sukcesplene atingos la 50-jaran datrevenon de la fondiĝo. Kaj mi forte esperas, ke nia Fondinto, Honora Prezidanto A.W. Thomson, "Avoto", festos kun ni tiun jubileon. Kaj mi kuraĝas esperi, ke tio estas la lasta jubileo de SEL, pro la fakto ke Esperanto tiam estos ... rekonata de la Mondaj Skolt(in)aj Oficejoj ... kaj uzata! Tio estu nia revo por la estonto.

Ĉu Lilienthal aŭ la fratoj Wright aŭ Bleriot en siaj tempoj povis antaŭvidi, ke en 1965 aviadiloj transflugas la oceanojn kun dekoj da personoj dum kelkaj horoj? Ni vivas en intereseĝaj tempoj, indaj por Junularo kiu volas servi al la Homaro - kondiĉe ke ĝi uzos la revoluciajn inventaĵojn por la Bono kaj ne al Detruo de la homaro aŭ de la mondo. Ni pripensu la vortojn de nia kara formortinta Fondinto, Lordo Robert Baden Powell of Gilwell: "Ne perdu unu minuton en via vivo, kaj forlasu la mondon iomete pli bonan ol vi ĝin trovis". Tiuj vortoj korespondas al la vortoj de

S.ta Paŭlo, la patrono en diversaj landoj de la Rover-skoltoj, kiu diris antaŭ sia morto: "Mi batalis la bonan batalon". Tion mi tutkore deziras al vi ĉiuj!

Kiam mi nun eksiĝas kiel Prezidanto, tio ne signifas, ke mi forlasas SEL. Mi restos membro, kaj esperas, ke miaj aĝo kaj fortoj ankoraŭ permesos al mi labori por mia Skolta Esperanto-Idealode Mondfrateco. Sur la terenoj de religio, patrujo, familio, profesio kaj eĉ amuzaĵo ni - geskoltoj precipe - faru nian Devon. Kaj kiam oni tion faris, ni nur faris kion ni devis fari, sen atendi iun rekompencan. Post la morto, Dio nin rekompencos.

Kaj nun mi prezentu al vi mian posteulon, mian tre bonan amikon, Douglas Murphy, kiu agis ĝis nun kiel Vicprezidanto. Vi jam multe legis pri li kaj de li en nia revueto. Li ne estas novulo inter ni. Jam longe antaŭ la milito li tre aktive kunlaboris, i.a. kiel redaktoro de nia tiama "Skolta Bulteno". Li esperantigis en 1917, aligis al S.E.L. 1918, kiam tiu fondiĝis. Post la milito li dum kelkaj jaroj funkciis kiel vicsekretario. Li ankaŭ estas membro de Brita Esperanto Asocio kaj de Kristana Esperantista Ligo Internacia. Per diplomo li estas nomata Fratulo de Brita Esperantista Asocio. Li intencas ĉeesti la 50-an U.K. en Tokio, kaj helpos organizi tie, kun nia japana N.R., SEL-kunvenon, al kiu mi diziras plej grandan sukceson, des pli ĉar la japana ĉef-skolto, Vicgrafo Michiharu Mishima, lernis Esperanton antaŭ la milito. (Li estis la unua skoltestro, vidinte mian E-in-signon sur la skoltĉemizo, kiu alparolis min dum la Intern. Skoltkonferenco en Salzburg 1954.)

Murphy aliĝis al Brita Skolta Asocio 1918, iĝis patrolestro, subtrupestro, distrikta estro, sekretario de sia urba asocio, distrikta vickomisaro, kaj nuntempe estas Provinca Komisararo por Rilatoj. Mi konatiĝis kun li 1928 dum la 20-a UK en Antverpeno. Li gajnis sian Lignan Insignon (Wood Badge) ĉe Gilwell Park, kaj ricevis la Arĝentan Glanon (Silver Acorn), la duan plej altan honoron de Brita Skolta Asocio.

Kara Murphy, ni dankas vin kaj deziras al vi sukceson!

Sed la plej bona generalo ne povas venki se oficiroj kaj soldatoj ne sekvas lin. Mi ege petas vin, unue la Naciajn Reprezentantojn kaj poste ĉiujn SEL-anojn, firme kaj regule kunlabori kaj doni ĉiujn viajn eblajn fortojn por antaŭen-puŝi la Skoltan Esperantistan Ligon, eĉ kiam malfacilaĵoj aŭ malsukcesoj sin prezentas. Ne forgesu: La persistemo venkas. Grandan prosperon al S.E.L.

J. Van Gulck.

Eble ne multaj ankoraŭ scias ke en tiu jaro Esperanto estis unu el la tri oficialaj lingvoj, (aŭ estUS...) de la ĵamboreo. La hungara ĵamborea estraro decidis tiel. Sed la tiama Direktoro de la tiamnomita "Internacia Skoltoficejo" (nuntempe: Monda Skolta Oficejo) decidis alimaniere kaj malpermesis la uzon de Esperanto, kiu estis afero de ...komunistoj(?). (Ĉu eble tio estis la kialo de la forigo pli malfrue de la teksto favore al Esperanto el la libro de Baden Powell, sub la ĉapitro VI: Tendarfajro n<sup>o</sup>16?).

En 1934 la tiama Internacia Skolta Komitato decidis: "La Komitato ne rekomendas la studon de Esperanto al skoltoj, konsiderate ke ĝi havas nur malgrandan praktikan valoron". Tamen, B.P. skribis en sia libro "Skoltismo por Knaboj" sub la ĉi-supre nomita ĉapitro, paĝon 202 (eldono 1908): "Tiuĉi lingvo estas uzata en ĉiuj landoj, kio do permesas vin helpi vin eksterlande".

Kiam la Universala Esperanto Asocio fondis sian "Centron de Esploro kaj Dokumentado" ni petis la Direktoron, S-ron Prof. D-ron I. Lapenna, sendi regule ĝiajn eldonotajn dokumentojn al nia Monda Skolta Oficejo. Tio regule okazis seninterrompe. Kaj en 1964 ni petis ke tiuj dokumentoj ankaŭ estu sendotaj al la Monda SkoltINA Oficejo. La Direktoro denove jesis.

Ni ne dubas - certe ni esperas - ke iun tagon ambaŭ Mondaj Skolt(in)aj Oficejoj iĝos pli intersemaj. Almenaŭ nia Skolta oficejo jam montris iom da intereso, kiam ĝi aperigis dufoje ion pri Esperanto, la unuan fojon eĉ laŭ peto de Direktoro Spry mem. Ĉu la SkoltINA oficejo sekvas?

B.P. ŝatis diri: "Vidu larĝe". Ni povas esperi ke objektiva studo de la dokumentoj, kiujn C.E.D. eldonas, devas finfine konvinki la Estrarojn de ambaŭ M.S.O. ke Esperanto estas nepre necesa en nia Monda Skoltfrataro, almenaŭ kiam oni kredas ke "fratoj" devas kompreni unu la alian. Tio estus konforma al la vortoj de la Monda Ĉefskoltino, Olave Baden Powell, kiam ŝi skribis post la lasta milito al D-ro Devillers, membro de la Usona Esperanto-Ligo:

"Mi jam multfoje prifsensis - kaj estus belege se S-ino Roosevelt povus konvinki Usonon disvastigi Esperanton en la tutan mondon kaj enkonduki ĝin en la programojn de ĉiuj lernejoj kaj organizaĵoj. Se ni povis atingi tion, tio estus por la Mondo granda bono kaj precipe utile por pli bona interkompreno ĉe la Popoloj, kiuj - kiel vi diras - estas dividitaj per la diversaj lingvoj".

Ni firme esperu ke 1965, la "Jaro de la Internacia Kunlaboro" alportu ankaŭ en la skoltaj rangoj la tiel necesan efektivigon de vera "Skolta Mondfrataro".

Novajfo el USONO. La Nacia Representanto C. Stan. Otto demetis la funkcion pro familiaj kaj profesiaj kaŭzoj. Ni bedaŭras tion, Stan, ĉar vi faris grandan laboron por Esperanto en Usono. La Usona sekcio iĝis la plej forta, dank' al vi.

Inter la kunlaborantoj, kiujn formis Stan, estas Larry Alden GREENE, el Knoxville, Tennessee. Li naskiĝis en Chattanooga 22.XI.1945, estas universitata studento. Li estas "Agla Skolto", membro de "Cherokee Council". Esperantiĝis 1963 kaj membriĝis en SEL. Li nun transprenas la taskon kiel Nacia Representanto. Via tasko ne estos malgranda, sed certe interesa. Ni deziras al vi plenan sukceson - en skolta laboro kaj ĉe la universitato.

Stan. Otto tamen transprenis novan funkcion - tiun de AMERIKA SEL-Komisiulo.

+++++

### NOVAJ LIBROJ

Legu kaj Lernu, kajero 1:  
"El Afriko" 24-paĝa. Eld.:  
Derrick P. Faux.

Legu kaj Lernu estas la titolo de serio da libretoj, el kiu la unua n-ro ĵus aperis. La celo de la serio estas helpi al infanoj la lernadon kaj uzon de Esperanto. La unua n-ro temas pri Afriko, kaj enhavas kantojn (kun muziko), artikolojn, bildojn por kolorigo de bestoj kaj birdoj, ludojn ktp. Interesa estas "DIPIDU", skolta kanto el Ugando. La prezo estas 3 steloj + afranko por unuopaj numeroj, 21 steloj (afrankite) por la serio de ses. La abonantoj de la serio ricevos aldonan gazeton kun demandoj (labortaskoj) pri la enhavo, anoncetoj pri korespondo k.c. Mendojn sendu al s-ro Faux, Valley Farm House, Charndon near Bicester, Oxon, Anglujo aŭ al naciaj libroservoj aŭ UEA-representantoj.

DHW

"Ni parolu Esperanton" de  
Markarian. Eld. University  
Tutorial Press LTD. Prezo 4s.9d.

Nova lernolibro por infanoj, ĉiu leciono kun bildo speciale desegnita (de Sidney Moore) al kiu ligiĝas demandoj kaj respondoj laŭ vivplena maniero. Tiel la lernantoj alkutimiĝu al la buŝa uzo de Esperanto. Poste estas legaĵo pri la bildo, kaj demandaro (taskaro por skriba aŭ buŝa respondado) Glosaro kun traduko anglen. Unu ĉapitro temas pri skoltoj en la arbaro. Inter la kunlaborintoj ni trovas la nomon George Rust. Certe la libro bone taŭgas, kaj kiu deziras ĉi tiun metodon, uzu ĝin. Lernolibroj al infanoj ne tro abundas.

Haro

- Mangû!

Li montras al griza, ŝtonsimila bulo, kiun li certe prenis el la cindrararo.

- Mi devas unue...jes, estas absolute necese.

- Jen, apud la ŝtono.

Arne iras apud la ŝtonon. Jen truo, facile kovrebla. Jen la ŝtono, al kiu li povas apogi la dorson. Pli sobran bivuakon oni povas serĉi! Kaj kion Karl rakontis pri Brattlien? Pri neestingita fajro, pri hermetikujo kaj papero lasitaj. Ne, tiu ne ŝajnas esti tia. Tiu ĉi ne estas freneza!

Li revenas al la fajro. Prenas la cindrobulon, forigas la cindron, kaj metas la dentojn en la tamen bongustan mangajŝon.

- Vi ne estas Brattlien, vi estas...

Granda mano kovras lian buŝon. Kaj li aŭdas la timigan voĉon de antaŭe:

- Silentu, knabo. Jam vi detruis por mi mian belan bivuakon. Ni devas for, tuj. Do mangû rapide!

## XI

La knaboj denove serĉas. Pli singarde ol antaŭe ili serĉas, serĉas. Kaj denove ili trovas senfolian branĉeton apud la vojo. Kaj poste la foliojn de betulo inter la abioj. Jes, Arne deziras ke ni sekvu! Eĉ ĉe la krucvojo li faris signon. Arne estas unika.

✱

Vidu - la fonteton! Kaj jen, postsigno de viro!

La knaboj diligente studas la lokon, kie la fremdulo evidente havis sian kampon. Kaj inter la fervoraj knaboj, Karl certe estas la plej fervora. Li uzas sian centimetran mezurilon, kiun li havas en la ĉemiza poŝo, li rigardas la malgrandan fajrejon, ankoraŭ varman, sed sen la plej malgranda fajrero. Kaj li diras:

- Mi estas tute certa, ke tiu fremdulo ne estas Brattlien.

- Sed kial?

- Ĉar la unua postsigno, kiun mi vidis de li, estis la malordemo. Mi devis malbruligi la fajron, kiun li lasis, tute sen atenti, ĉu ĝi ankoraŭ brulas aŭ ne. Sed vi ja mem povas rigardi tiun ĉi kampejon: La fajrejo sen fajreroj, la necesejo preskaŭ neretrovebla, ĉar li plenigis ĝin per tero, kaj en la tuta loko - absolute nenio...

- krom danko. Estas Per, kiu ne povis reteni la vortojn, tion ofte aŭditajn dum la preparaloj de kampejoj.

- Jes, vi pravas. Oni vere povas kredi, ke skolto ĉi tie loĝis, ne iu frenezulo. Jes, mi volas veti, ke tiu, kiu loĝis ĉi tie, ne estas freneza, sed ke li bone scias la regulojn de la liberaera vivado.

- Kial vi mezuris la postsignojn de la ŝuoj?

- Nu, mi ja ne povas diri tute certe kiom alta li estas. Sedni scias, ke Brattlien estas 1.83, kaj li, kiu loĝis ĉi tie, estis ne pli ol 1.70!

- Sed - nun Jens interrompas kun fervora voĉo - sed Arne estis ĉi tie. Ĉe la necesejo mi trovis ĉi tiun! Kaj li montras butoneton kun la skolta lilio.

Nun Ole ordonas: = Serĉu, ĉu vi povas trovi en kiu direkto ili nun iras!

Kaj la knaboj disiras de la kampejo, serĉante.

## XI

La duopo iras. Unue la knabo, tuj post li la viro. Kaj Arne pli ol unu fojon ekvidas, ke tiu viro ne hazarde elektas la vojon. La tero estas ĉiam seka, malmola tero, tiel ke postsignoj de la ŝuoj ne fariĝas. Tial li devas uzi ĉiun sian ruzon por fari signojn al la kamaradoj, en kiu direkto ili nun foriras. Kaj ĉiam la pensoj laboras: Tiu viro, li devas esti - pensu nur pri la dorsosako, kiun li nun kunprenis. Paktita, tiel ke la portanto facile povas ĝin porti. La bivuako, la fajrejo. Kaj nun la maniero per kiu li sin movas tra la arbaro.

Tuj post li iras la fremdulo. Ankaŭ li uzas ĉiujn siajn povojn. Li vere serĉas la vojojn, kiujn la knaboj povas plejmalfacile sekvi. Sed li jam vidis, ke Arne derompas, kvazaŭ nevole, hazarde, abian branĉon kiun li preskaŭ senpingligas, por poste faligi ĝin surteren, tiel ke la restantaj pingloj similas al montrilo. Li ankaŭ komprenas, ke la nova stumblo kaj terenfalo, ne estashazardo, sed intenco de la knabo, por denove fari sekretan signon al la kamaradoj. Kaj li denove pensas: Lerta knabo!

Sed nun li metas la manon sur la ŝultron de la knabo. Kaj la knabo senpripense obeas al la nedirita ordono, haltas, kaj rigardas laŭ la direkto montrita per la okuloj.

Jen alkino kun ido. La homa duo staras senmova, la besta duo malrapide iradas, manĝadas.



Post tio Arne ne plu dubas. Li konas la viron.

\*

La mevoj retrovas la vojon. La herbo apud vojeto estas rompita, kaj montras per la "kapoj" laŭ la vojeto. Malgrandan tufon, samloke elŝiritan, ili poste retrovas sur la vojeto. Kaj tria signo estas la montrilo el abia branĉo.

Ho, tiu Arne, kiu povas, eĉ Kiel kaptito, fari la signojnkaj la ordonojn!

- Vidu! Per preskaŭ ne povas diri la vorton, pro ekscito. Kaj li montras. La unuon fojon li nun vidas alkon, kaj jen du! Ankaŭ Sven ĝis nun ne vidis tian beston, kaj ili ambaŭ forte deziras resti por studi ilin.

- Ĝi ja ne havas la belan kronon. Denove Per, la etulo.

- Ne, estas ja alkinio kun ido. Kaj la alkinioj ne portas kronon. Tion faras nur la reĝo mem.

- Sed ne ne havas tempon por resti. Pensu pri Arne!

(finota)

+++++

### INVITO.

#### 3a Internacia Junularkonferenco

En la unua semajno de Aŭgusto (31.VII-7.VIII) okazos en Anne Frank-domo, Amsterdam junularkonferencon pri "Komunikado". La provizora programo entenas interkonatigan vesperon, oficialan akcepton en la Urbodomo, ekskurson, kulturan vesperon, balon, viziton al la Regna Instituto por la Tropikoj, ekskurson, filmojn, prelegojn. La kotizo estas 95 guldenojn ĝis 1.apr., kaj 100 guldenojn post tiu dato. Aĝo: 18-30. Vin anoncu al Anne-Frank-domo, Prinsensgracht 263, Amsterdam -C.

Je la sama adreso vi povas mendi la libreton "De Postdomo al Loĝdomo" en Esperanto. Prezo f 1.50 (=3steloj)

## Dyktighetsmerker.

(Merkene med H er hobbymerker.)



Astronom H



Birokter



Bekbinder H



# ANTAŬEN

Nia MONDA SKOLTA OFICEJO

kaj ESPERANTO



Dikter



Dyrebeskyttelse



Kiam mi skribis la artikolon "La Ĵamboreo de 1933 en G8d8ll8 kaj Esperanto, tiam kaj nun", mi ne antaŭvidis ke tiel rapide alvenis iu ŝanĝo, eble pli favora ol ni kredas, al la espero esprimita en la kvara paragrafo de la suprenomata artikolo. Relegu ĝin kaj tiam legu la jenon.



Esperanto



La laston tagon de 1964 mi ricevis leteron de la Direktoro de la MONDA SKOLTA OFICEJO, Maj. Gen. D.C. Spry, kiu en mia esperantista skolta vivo estas la plej bela kaj esperdona Novjardonaco! Rekompenco por mia ekŝiĝo?

Jen la letero de Direktoro Spry:

"Je la kunveno de la Monda Komitato en Luxemburg en septembro, la demando pri Esperanto inter skoltoj estis pritraktata.

La Komitato pritraktis tiun demandon lastfoje en 1934, kaj rezoluciis jene: "La Komitato ne aprobas studon de Esperanto inter skoltoj, konsiderante tion el malgranda praktika valoro".

Je la nova kunveno, la Komitato konsentis pri jena eldiro, kiun mi ĝojas transsendi al vi: "Esperanto, kiel aliaj helplingvoj, pruvis sian utilon en multaj sferoj kaj en kelkaj Skoltaj Asocioj estas permesata por la Interpretista Insigno. La Komitato decidis nuligi la rezolucion de 1934, sed fari nenium alian paŝon."

Kvankam tio ne portas nin tre longan vojon, mikredas, ke vi samopinias, ke tio estas - laŭ via vidpunkto - paŝo en la bona direkto.

Via sincera D.C. Spry."

Kompreneble, mi ne atendis por respondi kaj profitis de la lasta tago de la malnova jaro por sendi al mia bona konatulo, Maj. Gen. D.C. Spry, la sekvantan leteron de dankesprimio, kies traduko jen sekvas:

"Mi tre dankas al vi pro via letero el la 28.a de decembro pri la nuligo de la 1934 - jara rezolucio pri Esperanto.

Vere, laŭ nia vidpunkto tio estas - kiel vi diras - paŝo en la bona direkto.

Mi esperas, ke vi aprobas la komunikon de tiu decido en la venonta eldono de nia organo "La Skolta Mondo!"

La nuligo de la 1934-rezolucio estas logika kiam oni konsideras la grandan progreson de Esperanto post la milito, kiun vi povis lerni el la dokumentoj regule senditaj al vi de U.E.A.

La decido venis ĝustamomente nun kiam UNO decidis nomi la jaron 1965 la "Jaro de Internacia Kunlaboro" kaj UEA decidis kunlaboro laŭ la linioj indiktia en mia letero el 23a de septembro.

Kun via aprobo mi petas vin afable transdoni mian dankon al la Monda Komitato pro la septembra decido."

Certe, la decido de la MONDA KOMITATO, de septembro 1964, ne ankoraŭ alportis la finan venkon; sed mi petas vin bone pripensi la situacion en 1964, komparatan je tiu de 1934, antaŭ 30 jaroj do. La M.K. decidis propravole, sen nia iniciative, nek insisto.

Baden Powell estis favora al Esperanto, en la unua eldono de sia libro "Skoltismo por Knaboj". Tiu teksto malaperis en postaj eldonoj, sed reaperis - kompreneble - en la faksimila eldono de 1957, okaze de la 50-jara jubileo de la fondigo de Skoltismo. En 1933 la tiama Direktoro de la tiama Internacia Skolta Oficejo malpermesis la uzon de Esperanto dum la ĵamboreo de Gödöllő (Hungarujo). Post la milito la Universala Esperanto Asocio fondis la fakon "Centro de Esploro kaj Dokumentado", kiu eldonas regule informajn dokumentojn pri la progresoj de Esperanto en la mondo. Tiuj dokumentoj estis regule senditaj al la Estraro de nia nuna Monda Skolta Oficejo. Sendube ni kuraĝas diri ke la legado de tiuj dokumentoj ne restis sen rezultoj kaj - eble - "oni memoriĝis ke en la maljunaj arĥivoj de la M.S.O dormis .. la decido de 1934, kiu ne plu estas aktuala. Ĉiukaze, dum la Konferenco de la MONDA KOMITATO de la M.S.O. en Luksemburgo en septembro 1964, la membroj decidis nuligi tiun malfavoran decidon kaj remalfermi la pordon.

S-ro Spry li mem diras en sia letero "this does not take us very much further", ("Tio ne portas nia tre longan urjon") tamen li pravas kiam li diras: "estas paŝo en la bona direkto". Mi ne dubas kaj neniu el NI povas dubi, kiam ni konsideras la favorajn kondiĉojn kiujn al ni alportas la klopodoj de U.E.A., okaze de la "Jaro de la Internacia Kunlaborado".

Ni devas ekspluati la okazon, prezentatanal ni en 1965. Estas vera devo por ni kunlabori al la peticio de U.E.A. kaj esti "pacaj batalantoj".

Neniu ripozo sen laboro. Neniu venko sen batalo. Antaŭen por plifortigi kaj efektiviĝi nian "Skoltan Mondfrataron", pere de Esperanto.

Ni profitu de tiu-ĉi okazo por denove tutkore danki Maj. Gen. D.C. Spry kaj la Membrojn de la Monda Komitato por ilia altestimata Novjardonaco. Ankaŭ mian amikon, Philip Tossijn, nian Belgan Internacian Komisaron, membron de la Monda Komitato, kiu tre simpatias kun Esperanto kaj helpis min akiri la Komunikon de tiu decido de la M.K.

J. Van Gulck.

+++++

### SEKCIAJ RAPORTOJ

#### El la Belga.

La lasta jaro estis pli sukcesa ol la antaŭa. La membraro kreskis de 18 al 24, kaj kelkaj aliaj skoltoj kaj multaj skoltinoj petis informojn. Ni tiam sendas malgrandan dokumentaron (revuoj, ekz. de nia trimonata informilo k.c.), kaj eĉ se granda parto de la informpetantoj ne aliĝas, ni povas sciigi pri Esperanto.

1964 estis la jaro de la rompiĝo de la malintereso inter katolikaj skoltinoj. Ilia revuo aperigis tri artikolojn kaj incitis al pluraj skribi al nia sekretario. Du eĉ sukcesis doni paroladon pri Esperanto en sia lernejo.

Ni regule eldonas trimonatan informilon "La Heroldo de la Belga SEL-Sekcio" en 200 ekz, nur fladralingve. Ni sendas ĝin i.a. al skoltestr(in)oj, kaj faras novan liston en ĉiu jaro, neglektante tiujn kiuj neniam reagas.

El la 24 membroj 20 abonas al "La Skolta Mondo".

Ni vendis 30 Eŭrosel-kursojn, kaj ankaŭ havas "vendofakon" kiu liveras librojn ktp.

Ni varbis kelkajn dekojn da subskribintoj al la JIK-agado de UEA. Tiu tasko daŭras en 1965.

Ni ankoraŭ havas la grandan favoron de la kunlaboro de nia Belga Internacia Komisaro, kiu nun estas membro de la Monda Skolta Komitato. Li ne estas esperantisto, sed simpatianto.

### El la Norvega.

La jaro ne donis grandajn venkojn. La membraro ankoraŭ estas tre malgranda, sed kreskis de 3 ĝis 5, el kiuj 3 skoltestroj kaj unu skolto.

La skoltina gazeto "Speiderpiken" montris favoran intereson, kaj peris kontakton kun skoltina roto en Kongsvinger. Tiu rotonun studas esperanton, kun la espero renkonti esperantistinojn dum la landa kamparo somere 1965. (Skoltinaj membroj: Atentu!)

La Skolta Asocio aprobis Esperanto-insignon laŭ postuloj proponitaj de mi. La skoltinaj asocioj jam antaŭe aprobis ĝin. (La insignon vi trovas ĉe la artikolo "Antaŭen", kune kun kelkaj aliaj norvegaj insignoj).

### MULTAJ GUTOJ ESTAS TUTA MARO!

Jam longe antaŭ La Skolta Mondo aperas, ĝi devas esti skribita kaj sendita al la presisto.

Tial ni ankoraŭ ne povas rakonti al vi, kiom da eltonditaj artikoloj atingis mian amikon en Rotterdam.

Sed jam mi havas alian taskon por vi!

Ĉu vi jam rakontis al via, au al alia skoltestro pri Esperanto, kaj pri S.E.L.? Ke vi povas korespondi kun multaj aliaj skoltoj, en multaj aliaj landoj. Rakontu al li! Montru al li la fremdajn poŝtmarkojn, la leterojn kaj la fotojn!

Kaj memoru:

Ne nur vi faras tion. Sed preskaŭ samtempe en la tuta mondo skoltoj faras la samon. Montras leterojn, fotojn, kaj parolas kun siaj skoltestroj.

Se UNU faras tion...tio ne gravas. Se MULTAJ faras tion.... tio estas grava. Ĉar Multaj gutoj faras tutan maron!

Poste : prenu poŝtkarton, skribu sur ĝi: vian propran nomon, la nomon de la skoltestro, kaj kion kaj la adresojn! vi montris al li. Sendu la karton al mia amiko: S-ro L J R BERLIJN, Pr. Hendrikkade 144 b, Rotterdam, Nederlando.

Mi donis al li belegan libron, kiun li forsendos al ia kunlaborinta skolto, se li ricevas almenau 25 poŝtkartojn!

KONSTANT.

Ensendita de Usona skoltpatrole.

## LA "DAKOTA" FAJREJO


Je pluraj tendarejoj mi ĉeestis, mi vidis la malsamajn lertaĵojn kaj ekipaĵojn de niaj skoltoj. De tendaro al tendaro mi observis novajn kaj malsamspecajn tendojn, uniformojn, standardojn k.c., sed ĉiam la fajrejoj restis plejparte la samaj; plejofte oni uzis la "Kaptistan Fajrejon" tra kiu blovas la vento inter aŭ rokoj aŭ stip-oj aŭ kelkfoje la tero, sed bedaŭrinde ĉi tiu fajrejo nekontrolebla radias nekonstantan varmon, tiel simile ol la rubfajro, tial la skoltoj certe ne povas prepari bongustan manĝaĵon. Li do simple dependas de lia malsato determini la guston de lia manĝaĵo. Ofte baldaŭ post kiam mi manĝis mi vagis en multajn tendarojn gustante "kuiritan plantojn aŭ beston" kaj scivolis kiel oni povus manĝi ĝin plaĉinde. La valora gusto estis ĉiam komplete perdita!

La fajroj daŭris kaj certe perdis ankaŭ la ligno provizo. Certe niaj skoltoj devos lerni konservi lignon kaj tiel bone kuiri manĝon ke ĝi estos al reĝo digna.

Mi hodiaŭ volas sciigi al ĉiuj la fajrejon iam uzitan de la pioniroj kaj la indianoj de la Vasta Ebena de okcidentaj Unuiĝintaj ŝtatoj. Ili ofte ne povis trovi pinarbojn, acerarbojn k.c. kiuj kreskas oriente. Ili devis uzi malgrandajn kverkarbojn, betularbojn, kaj malaltan subkreskaron kiuj produktas ardan flamon kaj longdaŭran lignokarbon por ke oni povas facile friti aŭ rosti aŭ boleti manĝaĵon laŭ ilia plejbona gusto. Pro manko de ŝtipoj kaj rokoj, la loĝantoj en la kampo uzis plejofte la teron, kaj per tio formis bonegan fajrejon el la tero per iomete da malfacileco.

Ili kolektis la subkreskaron kaj ŝage uzis ĝin.

Fosu tranĉeon proksimume 1 m  
longe 15-20 cm larĝe kaj  
profunde 15 cm. Fosu du  
truojn al unu flanko de la  
tranĉeon + 30 cm de la finoj,



12-15 cm diametre. Fosu tria truo ĉe la alia flanko en la mezo, kiel la antaŭaj, tiel profunde kiel la tranĉeo. Faru tunelon de la truoj al la tranĉeo kaj vi havas "Dakotan" fajrejon kun aertuboj al la fundo. Konstruu fajron tra la tuta tranĉeo kaj enmetu plurajn tavolojn de ligno kaj lasu ĝin ekbruli ĝis kiam estas neniuj flamoj. Tiam kuiru super la lignokarbo kaj certe vi ektrovos konstantan kaj longdaŭran varmon por kuiri bongustan manĝon taŭgan por la Reĝino!

C. Stanley Otto.

## V I C P R E Z I D A N T O V O J A Ĝ A S ( 2 )

En Oktobro la tiama Vicprezidanto kaj lia edzino kun aliageedza paro (ne-esperantista) faris seplandan rondvojaĝon per aŭto. Dum tiu ferio li faris plurajn interesojn kontaktojn pere de la internacia lingvo, kaj la geakompanintoj vere vidis Esperanton en la praktiko kaj nun povas rakonti al siaj konatuloj, ke esperanto estas ja vivanta lingvo de vivanta popolo, ĉar ili propraokule vidisĝian disvastigon kaj utilon en la ĉiutaga vivo. Interalie, la Vicprezidanto havis la plezuron renkonti en Bologna nian novan Nacian Reprezentanton por Italujo, Pietron Ferrara, kaj tiu hora babilado ĉe la kafotablo estis tre ĝojiga. En Loĉarno li esperas viziti nian intencatan N.R., por Svisujo F-inon Iree Molinari, sed malfeliĉe ŝi estis for en hospitalo en St. Gallen por pieda operacio. Kiel oni jam scias, li nun planas iri al Tokio ĉi tiun jaron kaj tiam li esperas renkonti nian japanan N.R., Sinzo Sumiya.

F.D.M.

### NOVA JARO.

Mi deziru al vi: La bonan novan jaron.

Jaro havas multajn tagojn. Ĉiu tago havas multajn horojn. Sed oni ne bezonas multajn minutojn por doni ĝojon al alia homo. Rideto, afabla vorto, donaceto, helpema mano - kaj viaj ĉirkaŭaĵoj estas pli afablaj! Kaj ankaŭ vi!

Ĉu tio influos al aliaj?

Kiom plaĉa estis la Kristnaska tempo! Tiam oni pensis ankaŭ pri aliuloj. Donis ĝojon al aliaj. Kaj donis ĝojon al si mem - per tio. Tiun Kristnaskan gojon oni povas kunporti dum la tuta jaro.

La rideto, la ĝentila vorto, la donaceto, la helpema mano - io el tio estu via ĉiutaga bonfaro. Ne kiel devo - sed el plaĉo.

Dum vi en mallonga periodo faris la ĉitagan bonan agon el placo-tio iĝos kutimo. La ago iĝos la agoj. Vi donos al vi mem plezuron per la ĉitagaj bonaj agoj - vi ricevos la bonan novan jaron - kiun mi deziras al vi kaj al viaj proksimuloj.

Malnova skolto.

SKOLTA ESPERANTISTA LIGO

(fondita en 1918)

Fondinto: "Avoto"

Honoraj Prezidantoj: "Avoto", Norman Booth, Kolonelo D.H. Davis,  
L.J. Van Gulck.

KONTINENTA KOMISIULO

AMERIKO: S-ro C.S. Otto, 7, Longview Road, Livingston, New Jersey,  
USONO

NACIAJ REPRESENTANTOJ

AŬSTRALIO: S-ro S.H. Milligan, 274 Mont Albert Road, Surrey Hills,  
E.10, Victoria

BELGUJO: S-ro Kamiel van Herp, Juul Moretuslei 312, Wilruk  
(Antwerpen)

BRAZILIO: nomota

BRITUJO: S-ro C. Bardsley, 42 Westbourne Street, Oldham, Lancs.

DANLANDO: S-ro Sejer Holgersen, Einarsvej 99, Lyngby, Kopenhago

FINLANDO: nomota

FRANCUJO: nomota

GERMANUJO: nomota

HISPANUJO: S-ro A. Pedro Marqueta, Avenida de Valencia 32,  
Zaragoza

ITALUJO: Pietro Ferrara, Via Leandro Alberti 13, Bologna

JAPANUJO: S-ro Sinzo Sumiya, Daido Kagaku Sooti K.K.,  
16 Suehirotyo Kitatu, Osaka

KANADO: S-ro John H.F. Hoyle, Box 421, Forest, Ont.

NEDERLANDO: S-ro J.K. Hammer, Wibautstraat 33, Zaandam

NORVEGUJO: P.M. Hans Amund Rosbach, Follidal

PORTUGALUJO: S-ro Joao Patricio de Melo, Rua Jacinto Nunes 17-3<sup>o</sup>  
Dt<sup>o</sup>, Lisboa I

SVEDUJO: S-ro Curt Bohman, Fack 7, Høgen

SVISLANDO: nomota

USONO: S-ro Larry A. Greene, Box 141, Stadium Hall, Knoxville,  
Tenn.

(Presita en Anglujo)

